



ISSN 1886-1997

Kajeroj el la Sudo

La 30^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k110/k110.html>



Se vi amas
Hispanion, ne
voĉdonu!



Ĉar neniu reprezentas vin

Ne voĉdonu!



N^o 110^a

Kajeroj

el la Sudo

*Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj
(HALE).*

*Calle Jabonerías, 6.3° D
30010 Murcia
Hispanio*

Enhavo

Redaktore: Tial oni ne voĉdonu.....	3
Atesto: Pri mia lando.....	5
Tiuj niaj: Ana María Iriarte.....	6
Kino: Abenámar kaj Unamuno.....	7
Literaturo:	
<i>Don' Huan, ĉ. 5^a</i>	9
<i>La Faraono, ĉ. 59^a</i>	12

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: Johano A. Cabezos.

Redaktas: Jesuo de las Heras.

Korektas: Jozefo Pina.

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun
artikolon, kiun ni trovos interesa kaj kies
enhavo mistraktas neniun personon.

Oni povas reprodukti la enhavon,
kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties aŭtoroj, ne la redakcio.

Kovrilo: La dekan de novembro okazos denove ĝenerala balotado. Ĝis kiam ni eltenos politikistojn, kiuj neniel reprezentas nin aŭ provizas nin per nia bonfarto anstataŭ siajn personajn kaj partiajn pecojn da povo? Neniel ajn ni povas akcepti tiun ĉi maldemokratian sistemon krom per nia

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €5 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

Konto **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al kajeroj@gmail.com

Notu, ke malfrua kotizo povas signifi perdi numeron.

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
Scribus, Bluefish, Gimp, gFtp kaj yafc.



Nesubskribi-
tajn artikolojn
verkis la re-
daktoro.

Tial oni ne voĉdonu

Ankorau malmankas homoj en Hispanio, kiuj skandaliĝas, kiam oni petas de li aŭ ŝi ne voĉdoni. Tio estas maldemokratia!, ili plendas indigne. Sed kio estas demokratia?

Laŭ mia modesta eltrovo, demokratio okazas nur kiam la nacio, tio estas, la popolo kiu naskiĝis kaj vivas en koncerna lando, diras al politikisto pri tio, kion ili devas fari kaj eĉ diri profite al nacio mem, ne al ŝtato. Bedaŭrinde, ne multaj homoj scias pri tio, kiu diferenco ekzistas inter lando, nacio, popolo, ŝtato, kaj politika klaso. Mi povus referenci interesajn librojn pri la afero, sed mi klopodos resti ĉe atingo de ĝenerala publiko, ne uzante fakistajn vortojn¹. Se oni deziras profundigi pri tiuj aferoj, mi povas citi la plej gravan kaj kompletan verkon, kiun mi trovis, eble la plej inda pri la temo, la *Teorio Pura de Respubliko*, de Antonio García-Trevijano Forte, 800-paĝe longa libro, kiu pristudas la originon kaj disvolvo de demokratio. Sed ankaŭ li verkis pli mallongan verkon, *Teorio Pura de la Demokratio*, per kiu li pruvas kial en Hispanio, kaj ĉiel ajn en Eŭropo kaj Ameriko krom, eble, Usono, ne ekzistas demokratio.



Resume, mi povas memori pri tio, kio estas bazo de demokratio: **reprezenco** kaj **divido de povoj**. Pri la unua, ni scias, ke deputitoj ne reprezentas nin, la civitanojn, sed siajn koncernajn partiojn politikajn. Sekve, ne estas demokratio en Hispanio. Aldone, en Hispanio deputitoj nomumas la Prezidenton de la Registaro, kaj li (aŭ espereble iam, ŝi) kutime estas deputito, same kiel siaj geministroj. En vera demokratio tio ne eblus, ĉar la **plenuma povo** neniel povas rilati al **leĝodona** povo, ĉar ĉiu el ili du devas vigli pri tio, ke la alia povo plenumas sian devon. Kaj ambaŭ devas esti kontrolataj tiucele ankaŭ de la **juĝa**

¹**Nacio** estas la homoj, kiuj naskiĝis en limigita peco da lando. Ekzemple, hispanoj naskiĝintaj en Hispanio estas la nacio hispana. **Lando** estas geografia koncepto. **Popolo** estas nacio kune kun alialandanoj, kiuj havas samajn politikajn rajtojn kiel nacioj de Hispanio. **Ŝtato** estas la registaro kaj ties funkciuloj, kaj politika klaso estas tiuj, kiuj vivas el politiko.

povo. Sed en Hispanio la plej altaj tribunaloj (nome la Supera Tribunalo, la Konstitucia Tribunalo kaj la organo de la Alta Povo Juĝa) estas nomumitaj de la deputitoj, ankaŭ laŭleĝe. Do, estas tri pruvoj pri tio, ke en Hispanio ne Teorio Pura de Demokratioekzistas demokratio. En Francio, ekzemple, oni elektas la Prezidenton per aparta balotado, kaj oni elektas deputitojn aparte, kaj la juĝistaron ne elektas la registaro aŭ deputitaro. Tamen, oni voĉdonas tie, kiel ĉi tie, listojn prezentatajn de partioj politikaj. En Britio oni elektas homojn, ne partiojn, kaj sekve ili devas respondeci antaŭ la civitanoj de sia distrikto, ne antaŭ sia partio. Do, se ili eksigas sian partion, ne estas problemoj pri sia seĝo en parlamento.

Do, se ĉiu povo estas en ununura manparo, tiu de Prezidento, ĉar li aŭ ŝi estas la gvidanto de sia partio kaj sekve de la deputitaro de sia partio, kiu elektas lin ĉar li ordonas ilin tiel, se sekve deputitaro elektas la juĝistojn, kiuj regas la ceterajn juĝistojn, kiel nomiĝas tiu politika sistemo? Ĉu **diktatoreco kvarjarlonga**? Nu, tio, kio okazis la 24an de oktobro, la forentombigo de Francisco Franko, iama diktatoro kaj Ŝtatestro de Hispanio, ĉu ne estas ago de diktatoro? Kun tiom multe da problemoj, kiujn ni havas, urĝis, ke lia kadavro ne plu estos sub la protekto de la plej alta kruco el la mondo!


Pro tiuj ĉi konsideroj, kiujn eble vi jam konis, se vi regule legas nian magazino, mi konsilas al vi la plej klara agado por demokratio: **ne voĉdonu la venontan dekan de novembro!** Jes, la kutima kialo voĉdoni estas, ke se ni ne voĉdonas, partianoj ja faros tion, tiel ke la samaj homoj regos en Hispanio. Tio estas vera, sed se vi voĉdonas, vi konsentas, ke regos la plej voĉricevanto, kaj sekve **vi estos komplico** lia. Se vi ne voĉdonas, kaj incitas aliajn homojn ne voĉdoni, vi asertas vian nekomplicecon al rezultanta diktatoro kvarjara, kaj fakte vi sentos, ke vi estas vere laboranto por demokratio kaj kolektiva libereco. Ĉar vera libereco estas elekti ĉu voĉdoni, ĉu ne. Sed voĉdoni nun estas tio, kion ĉiuj faras ŝafe, eĉ se prezidentoj ne plenumas tion, kion ili promesis kampanje. Jen nia sola armilo, nia sola laborilo: **la nevoĉdono**. Kaj politikistoj timas tion, ĉia politikisto. **Fek' al ili ĉiuj, ĝis kiam ili komprenos, ke ili estas je nia servo, ne ni je tiu lia aŭ ŝia.**

Dume, ni ĉiuj laboru por demokratio por ni ĉiuj, en Hispanio, en Eŭropo kaj en la mondo. Ĉar se registaroj ne obeas la popolon, ili perfidos la popolojn el la mondo, kaj servos kaj servigos nin ĉiujn je kaŝitaj povoj, kies celoj ne estas homaj kaj feliĉigaj, sed monavidaj kaj povavidaj. Kaj ni ne toleru tion. Ĉu neniam venis en vian kapon kiom facile vi povas venki ilin ĉiujn? Jes, per via simpla nevoĉdonado. Rezonigu viajn kamaradojn, familianojn kaj geamikojn, kaj kune ni konstruos pli bonan mondon.



Pri mia lando

Estas mirinde konstati pri tio, kiom multaj junuloj en Hispanio scias pri siaj lando, historio, tradicioj, popolaj rakontoj..., kaj vere ne estas multe. Ĉu tio okazas ankaŭ aliloke? Konstati tion estas facile: oni demandu al junulo de alia lando. Tio estas tio, kion juna Setajesh', de Iran', respondis al ni.



Irano limiĝas je de la nordo kun la respublikoj de Azerbajĝano, Armenio, kaj Turkmenio, kaj la Kaspja Maro; de la oriento kun Afganujo kaj Pakistano, kaj de la okcidento kun Turkio kaj Irako kaj de la sudo limiĝas kun la Persa Golfo kaj Omana Maro.

Ĉefurbo de nia lando, la plej granda urbo kaj kultura centro, ekonomia, politika, irana administra, estas la urbo de Tehran'. Iran' pro grandaj rezervoj de fosila brulaĵo estas modera potenco kaj grava areo en la mezoriento kaj inkluzive: la plej granda kampo de natura gaso en la mondo.

Petrolo-industrio, petrokemia kaj natura gaso estas antaŭirante en irano, ankaŭ nia lando havas riĉan kulturen heredaĵon aparte de ĝi kiel kvara rango en Azio kaj la dekdua rango en la mondo.

Irano estas lando kun kultura diverseco, kiu konsistas el lingvaj kaj rasaj grupoj. La plimulto estas ŝijaistoj.

Multaj irananoj parolas la lingvon Farsi, la turkan, la kurdan lingvon, la luran lingvon, la mazandaranan lingvon, la bluĉan lingvon, sed la oficiala lingvo en Irano estas la persa, alidirite Farsi.

Irano kiel lando kaj nacio estas malnova antaŭaĵo kaj ĝi estas unu el la plej historiaj landoj el la mondo.

Setayesh Etedalikhah

Tiuj niaj estas sekcio dediĉita al homoj, kiuj vivis aŭ vivas en Hispanio aŭ aliloke en Esperantio, kiuj estis aŭ estas gravas en hispana aŭ esperanta kulturoj.

De kiam mi estis infano, mi aŭdis diskojn pri Zarzuelo¹ kun voĉoj privilegiitaj, kiel Karlo Mungia, Inés Rivadenejra, kaj Ana María Iriarte, inter multaj aliaj. Ne estis multe da diskoj ĉe mi tiutempe, do mi preskaŭ parkeris la kantojn kaj la argumentojn, ĉar mia patro estis zarzuelamanto malriĉa.

Mi memoras la faman kanton *Ĉi tiu estas lia letero*², de zarzuelo *Gigantoj kaj Kapeguloj*, kies ĉefrolulinon, Pilar, aktorin Ana María Iriarte:

*Ĉi tiu estas letero lia
estas poŝtisto antaŭ la alia
kiun mi plej amas.
Malfruis letero
preskaŭ unu jaron
vivas kaj amas
min mia kompatinda paro!*

Muzike ŝia voĉo estis potenca kaj bone agordigita, kio ne ĉiam okazas kiam varias nuanco laŭ la kanto en ĉiu kantisto.



Ana María Iriarte Beruete naskiĝis en Madrido je 1927, kaj komencis kanti publike en Valensjo je 1945 per la opero *El soñador* (La sonĝisto), kaj poste rolis en gravaj operoj kiel *Aida*, *Werther*, *Cavallería rusticana* (Ĝentileco kamparana), *Carmen* kaj *Tosca*, sed plej fama ŝi estis pro siaj roloj en zarzueloj kiel *La verbena de La Paloma* (stratfesto honore al virgulino de La Kolombo), *Agua, azucarillos y aguardiente*, (Akvo, sukekubetoj kaj brando) kaj *La revoltosa* (la tumultemulino), pro kies surbendigoj ŝi estis plej fama en Hispanio kaj eksterlande. Sed kiam ŝi estis nur 32 jaraĝa, nur du jarojn post la morto de sia mirata orĥestrodirektoro Ataúlfo Argenta, ŝi decidis forlasi la scenejon, kaj dediĉis sin al sia familio kaj al instruadoj pri muziko kaj kanta arto.

¹Zarzuelo estas teatra verko hispana kies ĉefa karakterizo estas, ke paroladoj inter kantoj estas longaj, kaj pro tio la teatrantoj devas esti kaj bonaj kantistoj kaj bonaj aktoroj.

²La aluditan kanton oni povas aŭskulti ĉe <https://www.youtube.com/watch?v=11fcdX80iIU>

Tiuj, niaj

Abenámar kaj Unamuno

Hieraŭ mi vidis la filmon de Abenámar, *Mientras dure la guerra*, (Dum daŭros la milito) pri unu el niaj plej konitaj kaj mirataj pensistoj kaj verkistoj, S-ro Miguel de Unamuno. Mi esperis, ke ĝi montros la filozofion, literaturon aŭ almenaŭ la biografion de nia mirato, sed la filmo kondukis nur al tiu kverelo publika kun Generalo Millán Astray, fondinto de la Legio Hispana, kuntekstante ĝin pere de la priskribo de la ekveko de la Hispana Intercivitana Milito je 1936 en Salamanko, kaj la estigo kiel Generalestron aŭ *Generalísimo*, *Caudillo* (en la hispana, militestro) kaj ŝtatestro.

La titolo de la filmo mem, *Mientras dure la guerra*, (Dum daŭros la milito) referencas al la vortoj de generalo Cabanellas (Kabanegas), kiu estis la unua direktoro de la puĉo kontraŭ la respubliko kun la intenco malebligi la socian katastrofon, reganta en tiutempa Hispanio, kiu permesis bruligi preĝejojn kaj rabi kaj



murdi homojn nur pro tio, ke ili ne estis sufiĉe revoluciismaj. Pridiskutanta la aferon, Generalo Cabanellas postulis, ke oni aldonu tiujn vortojn, *Dum la milito daŭros*, sed en la finfina dokumento tiuj vortoj ne estis. Sed ili ĉiuj subskribis tion same, ĉar la afero urĝis. Tiel Franco ricevis la oficojn pri Generalísimo kaj Ŝtatestro sen tempolimo, kaj li profitis tion, restante tiel ĝis sia morto je la 20^a de novembro de la jaro 1975. Dum 44 jaroj lia kadavro restis en *Valo de Falintoj*, en tombo apud tiu de José Antonio Primo de Rivera, fondinto de partio Falange Española, ĝis 24^a de oktobro, kiam la registaro de Pedro Sánchez translokgis lian kadavron al tombejo de Mingorrubio, proksime de Madrido.

La filmo havas **kelkajn historiajn erarojn**, kiel ekzemple la starigo de la flago dukolora en Cáceres je la jaro 1936^a. Fakte tio okazis iom antaŭe

en Seviljo, ne en Salamanko. Ankaŭ la tiama kolonelo Millán Astray ne ĉeestis la kunvenon, kiam oni nomumis Frankon *Generalísimo*, kiel la filmo montras. Ankaŭ la streĉa sceno, kiam la edzino de Franco savas Unamunon el la furiozo de faŝistoj ŝajnas, ke neniam okazis, kiel pravas la suba foto, kiun oni faris tuj post la akto, dum kiu estis la supozita kverelo. Alia eraro estas, ke Unamuno havis kvar virajn filojn, sed ili ne aperas en la filmo, sed nur du filinoj kaj nepo.

Sed la filmo esas vidinda per si mem, se oni konsideras, ke ĝi estas libera studo pri historia homo, unu el la plej universalaj kaj gravaj homoj en la historio de Hispanio. Don Miguel de Unamuno Jugo estis grava filozofo kaj verkisto, krom katedrulo pri la Greka Lingvo en la Universitato de Salmanko, kies Rektoro li estis tri fojojn. Li apartenis al la literatura Generacio de 1898, kune kun verkistoj Ángel Ganivet, Ramón M. del Valle-Inclán, Jacinto Benavente (nobelpremiito je 1922), Vicente Blasco Ibáñez, kaj aliaj. Inter liaj verkoj elstaras novelo *Niebla* (kvankam li diris, ke li ne verkis novelojn, sed *nivolojn*, ĉar novelo estas pli fiksita genro ol tiuj, kiujn li faris) kaj la filozofia eseo *Pri la tragika sento de vivo*.

Mi rekomendas vidi la filmon, sed multe pli serioze rekomendas mi legi liajn librojn, precipe tiujn du citatajn supre.



Generalo Jozefo Millán Astray salutas Unamunon tuj post la supozita kverelo.

La misaventuroj de Don' Hŭan'

Post la juĝo Ŝerlin' kaj Don' Hŭan' renkontis denove kafcele, sed ili ne iĝis geamantoj ĉar ŝi estis edziniĝonta du tagojn poste. Ŝi invitis lin al sia geedziĝo, tamen. Kaj tie li estis, dezirante ŝin kaj edzon Marjon, feliĉon senfinan. Malgraŭ tio, post la geedziĝo la novedzino dancis kun Don' Hŭan' tuj post ŝi dancis kun sia nova edzo, kiu tre multe ĵaluzis. Ŝerlin' amas sian edzon, sed ŝi estis fascinata de Don' Hŭan'. Dum ŝi dancis kun li, ŝia edzo ne apartigis siajn ĵaluzajn okulojn el ili, kaj tio vere ĝenis ŝin, tiom multe, ke Don' Hŭan' portis ŝin al li post la unika peco, kiun ili dancis:

«Via edzino, Sinjoro», li diris. Marjo murmuretis *Dankon* kaj tiam Don' Hŭan' decidis, ke preferinde li revenos hejmen. Tio kaŭzis la unuan kverelon de la novaj geedzoj.

Ŝi diris, ke Don' Hŭan' ne gravas al ŝi. Tio, kio gravas multe al ŝi estas, ke li estas ĵaluza. Ŝi ne toleros lian ĵaluzon, do se li ne ĉesas pridubi ŝin, ŝi iros dormi ĉe siaj gepatroj tiun nokton, kaj ne revenos al li. Ili havis sian geedzan nokton bone, sed ŝi komprenis kiom malfeliĉa ŝia edzo estis pri Don' Hŭan'.

La venontan tagon ili komencos sian mielmonatan vojaĝon, sed antaŭ tio, ŝi diris al li, ke ŝi devas fari ion, pri kio ŝi ne

Gaja edzino

toleros pridubon. Tio surprizis lin, sed li memoris pri la vortoj de la antaŭa tago, do li diris, ke li fidus ŝin plene.

Sed tio, kion ŝi devis fari estis pardonpeti Donon Hŭanon. Ŝi sciis lian telefonnumeron pro la juĝo pri la morto de la patro de Anin', do ŝi telefonvokis lin kaj ili konsentis renkontiĝi en diskreta loko.

«Mi multe bedaŭras la konduton de mia edzo, Don'. Mi jam diris al li, ke se li daŭrigas tiel, mi forlasos

31 de octubre - 1-3-4-5 noviembre de 2017

TEATRO ROMEA

Don Juan Tenorio

de José Zorrilla

Compañía Teatral Cecilio Pineda

Dirección Julio Navarro Alberó

Laurel al mejor espectáculo 2001
Medalla de Oro Ciudad de Murcia

Certe la verko de José Zorrilla, kiun oni povas vidi en Mursjo ĉiun oktobron kaj novembron,

1817 - 2017 BICENTENARIO NACIONAL JOSÉ ZORRILLA Y MORAL TORO

ROMEA

lin eĉ se ni geedziĝis antaŭ nur kelkaj tagoj».

«Ho, ne, kara. Ne plaĉus al mi esti la kaŭzo de via divorco»

«Ne, vi ne estos, Don' Hŭan', sed la ĵaluzo de mia edzo».

«Ho, bone, mi ne scias kion diri. Mi komprenas, ke ĵaluzo povas esti serioza malsano».

«Kompreneble. Mi bedaŭras, ke mi ne konis vin antaŭe, Don'».

«Kio? Kial vi diras tion, Ŝerli'?»

«Plaĉus al mi koni vin pli bone...»

«Bone, memoru, ke vi estas ĵusedzinita kaj ekkomenconta vian mielmonatan vojaĝon, nur post kelkaj homoj».

«Jes. Plaĉus al mi havi suveniron de vi, eĉ tiel», ŝi diris prenante lian manon. Li estis tre surprizata fari ion, do li lasis ŝin gvidi lin. Ŝi prenis lin en virinan necesejon kaj unu el la etaj fekĉambroj sen lasi lian manon, kaj kiam ili estis en ĝi, ŝi blokis ĝin. Tiuj lokoj estas elpensitaj por nur unu persono, do ili estis tre proksimaj unu la alian, kaj por havi pli da spaco, ŝi malsuprenirigis la kovrilon de la fekseĝo kaj poste staris sur ĝi. Tiam ŝi malvestiĝis tute fronte al ŝokita Don' Hŭan', kaj malfermante siajn brakojn, ŝi diris:

«Prenu min, Don', bonvolu. Mi estas via nun».

Li diris nenion; fakte li povis pensi pri nenio por diri. Li konside-

ris la ideon turni sin kaj forkuri, sed poste li pensis, ke tio vundus la sentojn de Ŝerli' multe. Tial li lasis sin iri. Li brakumis ŝian talion kaj metis sian vizaĝon inter ŝiaj mamoj. Ŝi brakumis lin per siaj kruroj kaj alkroĉiĝis ĉirkaŭ lin. Ŝi poste glitis laŭ lia korpo ĝis kiam ŝi surgenuas antaŭ li, kaj faris ion, kion oni ne supozas, ke edzino de alia viro faras al oni. Post tio ŝi amindumis al li, eĉ se li nur povas doni seksfaradon al ŝi. Dum kelkaj minutoj ili seksumis, ĝis kiam ŝi atingis orgasmon, kaj nur kelkajn sekundojn post ŝi, li ankaŭ venis kaj sensarĝigis plene en ŝin. Post tio li helpis ŝin revestiĝi kaj akompanis ŝin ĝis la dua strato antaŭ ŝia hotelo.

Survoje, li diris:

«Ankoraŭ mi ne komprenas pri tio, kio ĵus okazis».

«Mi diris al vi, Don': mi volas suveniron de vi».

«Ĉu idon?»

«Eble».

«Sed eble via edzo faris ĝin al vi lastan nokton».

Ŝi ridetis dirante: «Eble. Aŭ tiun ĉi matenon. Aŭ vi ĵus faris ĝin. Mi ne scias. Sed tiu ido estos certe mia».

«Bonorde. Ĝi estos de via edzo, tamen. Mi celas diri, oficiale».

«Tion mi ne scias. Tio, kion vi ĵus helpis min fari estas aserti mian liberecon, kara. Mi estos kun mia edzo nur tiom longe, kiom mi volos. Kaj tiun ĉi matenon mi ne volis.

Seksumi kun vi estas grandioza, Don'. Tio helpas min resti ĉi tiujn dek kvin tagojn for de ĉi tie per nur pensado pri tiuj magiaj minutoj».

«*Enchanté, madame*», Don' Ĥŭan' diris iomete kliniĝante al ŝi. «Don' Ĥŭan' ĉiam je servo via».

«Mi prenas tion kiel promeson, Don'. La minuton, kiam mi revenos el Turkio, mi telefonos vin».

Tiumomenton li konsideris, ke estas prudente ĝisi ŝin, kaj kizante ŝian manon ŝi deziris al ŝi belajn mielmonatan vojagon kaj geedzan vivon. Poste li reiris hejmen.

Tamen, Marjo sekvis sian edzinon, kaj eĉ se li perdis ŝian spuron, li vidis ŝin reveni hotelen parolante al Don' Ĥŭan', kaj la manieron per kiu li kisis ŝian manon. Tio ne feliĉigis lin multe, sed li ne kuraĝis demandi al ŝi pri tio, de kie ŝi venas. Ankaŭ estis nenio malbona pri tio, ke ĝentila viro kisas la manon de lia edzino, ĉar tio estas respektema maniero. Je la fundo de sia koro, flatas lin la penso *Jes, vi kisu ŝian manon, sed tiu, kiu kuŝos kun ŝi en lito estas mi!*

Ŝi ŝajnis, ke ŝi venas de la kafejo hotela, kaj tuj vidante sian edzinon, li diris: «Ĉu via afero progresis bonorde?»

«Jes, kara, multe», ŝi diris malaperante en la banejon. «Post duŝo mi estos kun vi, karulo».

Li provis eniri la duŝambron, sed ŝi blokintis la pordon.

Kvin minutojn poste ŝi revenis

ruliĝinta en bantuko. Ŝi aŭdis la bruon, kiun li faris sur la pordo, sed ŝi ŝajnis, ke ŝi ne rimarkis.

«Kial vi blokis la pordon?»

«Ho, mi bedaŭras, kara. Ĉu vi bezonis necesejon? Estas kutimo mia, pro modesteco. Mi bedaŭras..., ne devas esti modesteco inter ni, geedzoj, mi komprenas. Mi promesas, ke mi provos memori. Se mi blokas ĝin al vi, bonvolu diri al mi».

«Memori pri kio?»

«Ne bloki pordon de vi. Mia edzo havas rajton ĉiam aliri mian korpon», ŝi diris lasante fali la tukon surplanken, tiel ke ŝi restis tute nuda antaŭ li kun ridetanta gastiganta vizaĝo.

Oni ne povus pensi, ke ŝi ĵus seksumis kun alia viro nur unu horon antaŭe. Marjo ne sciis tion, kompreneble, sed eĉ se li suspektis pri ĝi, li prenis ŝin tie, starante, sen ĝeni sin iri al proksima lito. Tiu estis la unua fojo en sia vivo, ke li faris tiel, kaj ŝia dua. Iam li aŭdis, ke ŝi diris, ke *nur bestoj seksumas starante anstataŭ kuŝante sur lito*, sed li estis tiom freneza pro tiu ĉi brunulino bela kun tiom longa hararo, ke li simple ne povus atendi ĝis kiam ili estis sur lito, kaj nun li scias, ke ŝi sentas same. Dum ili havas tiel mirindan seksumadon, li promesis al si mem, ke li neniam permesos sian ĵaluzon malplibonigi la rilaton kun sia edzino, sia mirinda, privata diino.

Daŭrigota

Ĉapitro 59^a

Forlasinte Abidoson, Ramzes veturis senhalte kontraŭ la fluo de l' rivero al la urboj Tan-ta-ren (Dendera) kaj Kene, kiuj kuŝis unu preskaŭ kontraŭ la alia: unu sur la orienta, la alia sur la okcidenta bordo de Nilo.

En Tan-ta-ren estis du famaj lokoj: la lageto de l' sanktaj krokodiloj kaj la templo de Hator, posedanta superan lernejon. Tie oni instruis la medicinon, piajn kantojn, diversajn diservojn, fine astronomion.

La faraono vizitis ambaŭ. Li ekkoleris, kiam oni ordonis al li bruligi incenson antaŭ la sanktaj krokodiloj, kiujn li opiniis malbonodoraj kaj malsaĝaj rampaĵoj. Kaj kiam unu el ili dum la oferado kaptis la sinjoron per la dentoj je la vesto, Ramzes tiel ekbatis ĝin per la bronza kulero, ke la rampaĵo por unu momento fermis la okulojn kaj disetendis la piedegojn; poste ĝi reiris en la akvon, kvazaŭ kompreninte, ke la juna monarĥo ne amas intimecon eĉ de la dioj.

—Eble tio estis malpiaĵo? —demandis li la pastron.

La ekscelenco rigardis flanken, ĉu iu aŭskultas, kaj respondis:

—Se mi sciis, ke via sankteco faros al ĝi tian oferon, mi donus al vi bastonegon anstataŭ incensujo. Ĉi tiu krokodilo estas la plej trudema besto en la tuta templo. Foje ĝi kaptis infanon...

—Kaj ĝi manĝis ĝin?...

—La gepatroj estis kontentaj!... respondis la pastro.

—Diru al mi— demandis la faraono post pripenso— kiel vi, saĝaj homoj povas fari oferojn al bestoj; kiam neniu rigardas, vi ja batas ilin per bastonoj!...

La ĉefpastro ankoraŭ unu fojon ĉirkaŭrigardis, kaj vidante, ke estas neniu proksime, respondis:

—Vi ja, monarĥo, ne suspektas la fidelulojn de la Sola Dio, ke ili kredas je la sankteco de l' bestoj... Tio, kion oni faras, oni faras por la popolaĉo... La bovo Apis, kiun ŝajne respektegas la pastroj, estas la plej bela bovo en la tuta Egipto kaj konservas la rason de nia brutaro. La ibisoj kaj cikonioj purigas de la mortintaĵo niajn kampojn; dank' al la katoj la musoj ne detruas niajn provizojn da greno, kaj dank' al la krokodiloj ni havas bonan akvon en Nilo, kiu alie venenus nin... Sed la senkonsidera kaj malklera popolaĉo ne komprenas la utilecon de tiuj bestoj kaj ekstermus ilin en la daŭro de unu jaro, se ni ne antaŭgardus ilian vivon per religiaj ceremonioj. Jen estas la sekreto de niaj temploj, destinitaj por la bestoj, kaj de nia pieco por ili. Ni incensas tion, kion la popolo devas respekti, ĉar ĝi estas utila.

En la templo de Hator la faraono rapide trakuris la kortojn de la medicina lernejo kaj indiferece aŭskultis la antaŭdirojn, kiujn faris por li la astrologoj. Kaj kiam la ĉefpastro-astrologo montris al li oran tabulon, sur kiu estis gravurita karto de la ĉielo, la sinjoro demandis:

- Kiel ofte realiĝas viaj antaŭdiroj, kiujn vi legas en la steloj?
- Iafoje ili realiĝas.
- Kaj se vi legus viajn horoskopojn sur arboj, ŝtonoj aŭ sur akva fluo, ili ankaŭ realiĝus?

La pastro konfuziĝis.

- Via sankteco ne pensu, ke ni estas trompistoj. Ni antaŭdiras al la homoj la estontecon, ĉar ĝi interesas ilin, kaj ĝustadire, nur tion ili komprenas el la astronomio.
- Kaj kion vi komprenas?
- Ni konas— diris la pastro— la strukturon de la ĉiela firmamento kaj la movojn de l' steloj...
- Kiun tio povas utili?...
- Ne malgrandaj estas la servoj, kiujn ni faris al Egipto. Ni montras la ĉefajn direktojn, laŭ kiuj oni konstruas templojn kaj fosas kanalojn. Sen la helpo de nia scienco la ŝipoj, naĝantaj sur la oceano, ne povus forlasi la bordojn. Ni kunmetas la kalendaron kaj antaŭkalkulas la estontajn fenomenojn sur la ĉielo. Baldaŭ, ekzemple, ni havos mallumiĝon...

Sed Ramzes ne aŭskultis plu; li turnis sin kaj foriris.

"Kiel oni povas —pensis li— konstrui templojn por tiel infana ludo, kaj eĉ gravuri ĝiajn rezultatojn sur oraj tabuloj!... Ĉi tiuj senokupaj sanktaj viroj jam ne scias, kion fari!..."

Post mallonga restado en Tan-ta-ren Ramzes transpasis Nilon, por iri en la urbon Kene.

Tie estis nek sanktaj temploj, nek incensataj krokodiloj kaj oraj tabuloj kun steloj. Tie floris la potfarado kaj komerco. De tie iris du ŝoseoj al la havenoj de Ruĝa maro: Koseir kaj Berenice, kaj vojo al la porfiraj montoj, de kie oni venigis statuojn kaj grandegajn fragmentojn por la konstruaĵoj.

En Kene svarmis Fenicianoj, kiuj akceptis la estron kun granda entuziasmo kaj donacis al li diversajn juvelojn valorantajn dek talentojn.

Malgraŭ tio la faraono apenaŭ unu tagon pasigis en Kene, ĉar oni sciigis al li de Teboj, ke la respektinda mumo de Ramzes XII jam estas en la palaco Luksor kaj atendas la enterigon.

En tiu epoko Teboj estis grandega urbo kaj okupis ĉirkaŭ dudek kvadratajn kilometrojn. Ĝi posedis la plej grandan templon de Amon en

Egipto kaj multe da publikaj kaj privataj konstruaĵoj. La ĉefaj stratoj estis larĝaj, rektaj kaj pavimitaj per ŝtonaj platoj; la bordoj de Nilo formis bulvarojn, la domoj estis kvar- kaj kvinetaĝaj.

Ĉiu templo kaj palaco havis grandegan pordegon kun pilonoj, kaj tial oni nomis Tebojn urbo "centpordega". En realeco ĝi estis urbo unuflanke tre industria kaj komerca, aliflanke, kvazaŭ la sojlo de la eterneco. Sur la okcidenta bordo de Nilo, sur la montoj kaj inter la montoj estis sennombraj tomboj de pastroj, riĉuloj kaj reĝoj.

Sian brilon Teboj ŝuldis al du faraonoj: Amenofis III aŭ Memnon, kiu "trovis la urbon argila kaj lasis ĝin ŝtona" kaj Ramzes II, kiu finis kaj kompletigis la konstruaĵojn, komencitajn de Amenofis.

Sur la orienta bordo de Nilo, en la suda parto de l' urbo estis tuta kvartalo de grandegaj reĝaj konstruaĵoj: palacoj, somerdomoj, temploj, sur kies ruinoj nun estas konstruita la urbeto Luksor. En ĉi tiu kvartalo la restaĵoj de l' faraono atendis la lastajn ceremoniojn.

Kiam venis Ramzes XIII, la tuta urbo forlasis la domojn, por saluti lin, hejme restis nur maljunuloj kaj kripluloj, kaj en mallumaj stratoj ŝtelistoj. Tie unuafoje la faraono aŭdis kriojn kaj malbenojn kontraŭ la pastroj, kio ĝojigis lin, kaj postulojn, ke ĉiu sepa tago estu festo, kio lin mirigis. Li deziris doni tian donacon al la laboranta Egipto, sed li ne supozis, ke liaj intencoj jam fariĝis publike konataj kaj ke la popolo atendas ilian realiĝon.

La vojaĝo da unu mejlo daŭris kelke da horoj, inter densaj amasoj. La reĝa veturilo tre ofte haltis kaj ne moviĝis, antaŭ kiam la gvardio de lia sankteco sukcesis levi tiujn, kiuj kuŝis sur la ventro.

Kiam la faraono atingis fine la reĝan ĝardenon, kie li okupis unu el la malgrandaj somerdomoj, li estis tiel laca, ke en ĉi tiu tago li ne okupis sin per la aferoj de l' ŝtato. En la sekvinta tago li bruligis incensojn antaŭ la mumo de l' patro, kiu estis en la ĉefa reĝa konstruaĵo, kaj diris al Herhor, ke oni povas transporti la restaĵojn en la tombon.

Sed oni ne faris tion tuj.

De la palaco oni transportis la mortinton en la templon de Ramzes, kie li ripozis unu tagon. Poste kun granda soleno oni enkondukis la mumon en la templon de Amon-Ra.

La detaloj de la funebra ceremonio estis samaj, kiel en Memfiso, sed multe pli grandiozaj.

La reĝaj palacoj, sur la dekstra bordo de Nilo en la suda parto de l' urbo estis kunigitaj kun la templo de Amon-Ra, en la norda parto, per vojo, unika en ĝia speco. Tio estis aleo, du kilometrojn longa, tre larĝa; ĉe ĝiaj

ambaŭ flankoj estis plantitaj grandegaj arboj kaj staris duobla vico de sfinksoj. Unuj havis leonajn korpojn kun homaj kapoj, aliaj kun ŝafaj. Ili estis kelkcent.

Sennombraj popolaj amasoj de Teboj kaj de l' ĉirkaŭaĵo puŝis unuj aliajn ĉe ambaŭ flankoj de la vojo; tra la mezo antaŭeniris la funebra procesio. Iris orkestroj de diversaj regimentoj, taĉmentoj de ploristinoj, ĥoroj de kantistoj, ĉiuj metiaj kaj komercaj korporacioj, deputatoj de kelkdeko da nacioj, kiuj estis en rilatoj kun Egipto, kun siaj dioj kaj standardoj... Kaj ree orkestroj, larmistinoj kaj pastraj ĥoroj.

Ankaŭ ĉi tiun fojon la reĝa mumo estis portata en ora ŝipeto, sed multe pli luksa, ol en Memfiso. La veturilo, al kiu estis jungitaj ok paroj da blankaj bovoj, estis preskaŭ du etaĝojn alta, kaj preskaŭ malaperis sub la amasoj da bukedoj, strutaj plumoj kaj multekostaj teksaĵoj. Ĉirkaŭis ĝin densaj fumoj de incensoj, kio faris la impreson, ke Ramzes XII sin montras al sia popolo jam kiel dio, en la nuboj.

De la pilonoj de ĉiuj tebjaj temploj sonis kvazaŭ tondroj, kaj potencaj, larmantaj sonoj de bronzaĵoj.

Kvankam la aleo de la sfinksoj estis libera kaj larĝa, kvankam la marŝo estis kondukata de la plej bonaj egiptaj generaloj, sekve en la plej granda ordo, tamen por trairi la du kilometrojn inter la palacoj kaj la temploj de Amon, la procesio uzis tri horojn.

Nur kiam oni jam enportis la mumon de Ramzes XII en la templon, el la palaco, en ora kaleŝo, tirata de du vivaj ĉevaloj elveturis Ramzes XIII. La popolo ĉe ambaŭ flankoj de la aleo, kiu dum la procesio staris silente, nun, vidante la amatan monarĥon, ektondris per tiel grandega aklamado, ke disfluis en ĝi la sonoj kaj bruoj de la supro de l' temploj.

Estis nun momento, ke la popolaĉo, puŝata de la entuziasmo, volis elkuri sur la mezon de la aleo kaj ĉirkaŭi la sinjoron. Sed Ramzes per unu sola gesto de l' mano haltigis la vivantan fluon kaj malhelpis la malpiaĵon.

En la daŭro de dekelko da minutoj la faraono traveturis la korton kaj haltis antaŭ la grandegaj pilonoj de la plej grandioza templo en Egipto.

Kiel Luksor estis la kvartalo de la palacoj en la suda parto de l' urbo, tiel Karnak estis la kvartalo de l' dioj en la norda. La ĉefa centro de Karnak estis la templo de Amon-Ra.

La konstruaĵo okupis du hektarojn, kaj la ĝardenoj kaj lagetoj, ĉirkaŭantaj ĝin, pli ol dudek hektarojn. Antaŭ la templo staris du pilonoj dek etaĝojn altaj. La korto, ĉirkaŭita de koridoro, apogita sur kolonoj, okupis ĉirkaŭ unu hektaron, kaj la kolona ĉambrego, kie kunvenadis la privilegiantaj klasoj, estis duonhektara. Tio ne estis ĝustadire konstruaĵo,

sed provinco.

La ĉambrego aŭ hipostilo estis pli ol cent kvindek paŝojn longa kaj sepdek kvin larĝa, ĝia plafono estis apogita sur tridek kvin kolonoj. El ili dudek centraj kolonoj havis po dek kvin paŝoj da ĉirkaŭo kaj kvar ĝis kvin etaĝojn da alto!... La statuoj en la templo, ĉe la pilonoj, kaj ĉe la sankta lageto havis respondajn proporciojn.

En la grandega pordego atendis la faraonon Herhor, la ĉefpastro de la templo. Ĉirkaŭita de tuta stabo de pastroj Herhor salutis la monarĥon preskaŭ fiere, kaj bruligante antaŭ li incensojn, ne rigardis lin. Poste tra la korto li kondukis la faraonon en la hipostilon kaj ordonis enlasi la deputataron en la internon de la mura zono.

En la mezo de la hipostilo estis la ŝipeto kun la mumo de la mortinta monarĥo, kaj ĉe ambaŭ ĝiaj flankoj du same altaj tronoj. Sur unu sidiĝis Ramzes XIII, ĉirkaŭita de la generaloj kaj nomarĥoj, sur la alia Herhor, ĉirkaŭita de la pastroj. La ĉefpastro Mefres donis al Herhor la tiaron de Amenhotep, kaj la juna faraono duan fojon ekvidis sur la kapo de Herhor la oran serpenton, la simbolon de la reĝa povo.

Ramzes paliĝis de kolero kaj pensis:

"Ne bezonu mi demeti de vi la ureuson kun la kapo!..."

Sed li silentis, sciante, ke en ĉi tiu plej granda egipta templo Herhor estas sinjoro, egala al la dioj, kaj potenculo, eble pli granda ol la faraono mem.

Dum la tuta tempo, kiam la popolo plenigadis la korton kaj post la purpura kurteno, apartiganta la mortulojn de la sanktejo, sonis harpoj kaj mallaŭtaj kantoj, Ramzes rigardis la ĉambregon. Tuta arbaro de potencaj kolonoj, kovritaj de la planko ĝis la supro per pentraĵoj, mistera lumigo, plafono, pendanta ie sub la ĉielo, faris sur lin premegan impreson.

"Kion valoras —pensis li— gajni batalon apud Sodaj Lagoj?... Konstrui tian templon, jen estas verko!... Kaj ili ĝin konstruis!..."

En tiu momento li sentis la potencon de la pastraro. Ĉu li, lia armeo, kaj eĉ la tuta popolo povus renversi ĉi tiun templon?... Kaj se malfacile estas sukcesi kontraŭ konstruaĵo, ĉu pli facile estos batali kontraŭ la konstruintoj?

El la malagrablaj meditoj elŝiris lin la voĉo de la ĉefpastro Mefres:

—Via sankteco— diris la maljunulo— vi la plej nobla konfidato de l' dioj (li salutis Herhoron); vi nomarĥoj, skribistoj kaj simpla popolo! La glora ĉefpastro de ĉi tiu templo, Herhor, alvokis vin, por ke vi juĝu, laŭ la antikva moro, la terajn agojn de la mortinta faraono kaj rifuzu aŭ

donu al li la rajton de l' enterigo...

La kolero leviĝis al la kapo de l' faraono. Ne sufiĉas, ke oni malŝatas lin en ĉi tiu loko, sed ili eĉ kuraĝas diskuti pri la agoj de lia patro kaj decidi pri lia enterigo...

Sed li trankviliĝis. Tio estis nur formalajaĵo, tiel antikva, kiel la egiptaj dinastioj. Ĝustadire tio ne estis juĝo, sed laŭdo al la mortinto.

Laŭ signo, farita de Herhor, la ĉefpastroj sidiĝis sur taburetoj. La nomarĥoj kaj generaloj, ĉirkaŭantaj la tronon de Ramzes, ne sidiĝis: por ili oni ne preparis seĝojn.

La faraono ekmemoris ankaŭ ĉi tiun ofendon; sed li jam tiel regis sin, ke oni ne povis rimarki, ĉu li vidis la malŝaton al la siaj.

Dume la sankta Mefres meditis pri la vivo de la mortinta sinjoro.

—Ramzes XII— diris li— faris neniun el la kvardek du pekoj, do la juĝo de dioj estos favora por li. Krom tio la reĝa mumo, dank' al la escepta zorgemo de la pastroj, estas provizita per ĉiuj amuletoj, preĝoj, konsiloj kaj ĵuroj, estas do sendube, ke la faraono jam loĝas kun la dioj, sidas apud Oziriso kaj mem estas Oziriso. La dia naturo de Ramzes XII montriĝis jam dum lia tera vivo. Li regis pli ol tridek jarojn, donacis al la popolo profundan pacon kaj konstruis aŭ finis multe da temploj. Krom tio li mem estis ĉefpastro kaj superis per sia pieco la plej piajn pastrojn. En lia regado la unuan lokon okupis la respekto al la dioj kaj la relevado de la sankta pastraro. Pro tio amis lin la ĉielaj fortoj, kaj unu el la tebahaj dioj, Ĥonsu, petita de la faraono, bonvolis iri en la landon Buĥen kaj tie elpelis la malbonan spiriton el la reĝa filino.

Ripozinte iom, Mefres daŭrigis:

—Nun, altranguloj, kiam mi pruvis al vi, ke Ramzes XII estis dio, vi demandos, por kia celo ĉi tiu supera estaĵo malsupreniris la egiptan teron kaj pasigis sur ĝi kelkdekon da jaroj? Por levi la mondon, kiu falis de la ruino de kredo. Kiu sin okupas hodiaŭ pri la pieco, kiu zorgas plenumi la volon de la dioj? En la malproksima nordo ni vidas grandan asirian popolon, kiu kredas nur je la forto de la glavo, kaj anstataŭ pri , saĝo kaj pieco, ili sin okupas per la sklavigo de la popoloj. Pli proksime de ni loĝas Fenicianoj, por kiuj la oro estas dio, la trompo kaj procentegoj estas ilies pieco. Fine aliaj popoloj, Ĥetoj oriente, Libianoj okcidente, Etiopianoj sude kaj Grekoj sur Mediteraneo estas barbaroj kaj rabistoj. Anstataŭ labori, ili ŝtelas, anstataŭ perfektigi en la saĝo, ili drinkas, ludas ostojn aŭ dormas, kiel lacaj brutoj. En la mondo ekzistas nur unu vere pia kaj saĝa popolo, la egipta, sed rigardu, kio okazas ankaŭ ĉi tie? Alfluis sendiaj fremduloj, kaj la religio falis ankaŭ ĉe ni. La nobeluloj kaj altranguloj ĉe kruĉoj da vino mokas la diojn kaj la eternan

vivon, la popolo ĵetas koton sur la sanktajn statuojn kaj ne faras oferojn al la temploj. La piecon anstataŭis la lukso, la saĝon la malĉasteco. Ĉiu volas porti grandegajn perukojn, sin olei per eksterordinaraj parfumoj, posedi broditajn per oro ĉemizojn kaj antaŭtukojn, sin ornami per ĉenoj kaj braceletoj, inkrustitaj per multekostaj ŝtonoj. La hordea pano ne sufiĉas plu al li: li deziras kukojn kun lakto kaj mielo; la piedojn li lavas per biero, la soifon li estingas per eksterlandaj vinoj. La tuta nobelularo dronas en ŝuldoj, la popolo estas batata kaj troŝarĝita, en diversaj lokoj eksplodas ribeloj. Kion mi diras: en diversaj lokoj!... De iom da tempo; dank' al misteraj konspirantoj en la tuta Egipto, longe kaj larĝe, ni aŭdas unu krion: "Ĉiun sepan tagon donu al ni la ripozon!... Ne batu nin sen juĝo!... Donacu al ni po unu bedo da tero kiel propraĵon!..." Tio antaŭdiras la ruinon de nia ŝtato, kontraŭ kiu oni devas trovi rimedon. La sola savo estas la religio, kiu instruas nin, ke la popolo devas labori, la sanktaj viroj, kiuj konas la volon de l' dioj, devas montri al ĝi la laboron, la faraono kaj liaj oficistoj devas kontroli, ĉu la tasko estas konsciencie plenumata. Tion instruas al ni la religio; konforme al tiaj principoj regis la ŝtaton Ramzes-Oziris XII egala al la dioj. Kaj ni, la ĉefpastroj, honorante lian piecon, gravuros la jenan surskribon en la tomboj kaj temploj:

"Horus bovo, Apis forta, kiu kunigis la kronojn de la regno, ora nizo, reganta per la glavo, venkinto de naŭ popoloj, reĝo de Supra kaj Malsupra Egipto, sinjoro de du mondoj, filo de la suno, Amen-mer-Ramessu amata de Amon-Ra, sinjoro kaj estro de Tebaido, filo de Amon-Ra, adoptita de Horus, kaj naskita de Hormaĥis, reĝo de Egipto, estro de Fenicio, reganta naŭ popolojn."

Kiam la propono estis akceptita per aklamado, de post la kurteno elkuris dancistinoj kaj dancis antaŭ la sarkofago sanktan dancon; la pastroj ekbruligis incensojn. Poste oni demetis la mumon de la ŝipeto kaj transportis en la sanktejon de Amon, kien Ramzes XIII ne havis rajton eniri.

Baldaŭ la religia ceremonio estis finita kaj la ĉeestantoj forlasis la templon.

Revenante en la palacon de Luksor, la juna faraono tiel dronis en siaj pensoj, ke li preskaŭ ne rimarkis la sennombran amason kaj ne aŭdis ĝiajn kriojn.

"Mi ne povas trompi mian propran koron —diris Ramzes al si mem.— La ĉefpastroj malŝatas min, kio okazis ankoraŭ al neniuj faraonoj; ili eĉ montras al mi, kiel mi povas reakiri ilies favoron. Ili volas regi la ŝtaton, kaj mi devas zorgi, ke oni plenumu ilies ordonojn... Sed estos alie: mi

ordonas, kaj vi devas plenumi... Kaj ĉu mi pereos, ĉu mi apogos sur viaj nukoj mian reĝan piedon..."

Du tagojn la respektinda mumo de Ramzes XII restis en la templo de Amon, en tiel dia loko, ke, ekster Herhor kaj Mefres, eĉ la ĉefpastroj ne povis tien eniri. Antaŭ la mortinto lumis nur unu lampo, kies flamo, mirakle konservata, neniam estingiĝadis. Super la mortinto flugpendis la simbolo de la animo, nizo kun homa kapo. Ĉu tio estis maŝino aŭ reala vivanta estaĵo, neniu sciis. Certe estis nur, ke la pastroj, kiuj kuraĝis sekrete rigardi la kurtenon, vidis, ke la estaĵo pendis en la aero sen apogo, movante la lipojn kaj okulojn.

Oni daŭrigis la funebran ceremonion, kaj la ora ŝipeto transportis la mortinton sur la alian bordon de Nilo. Sed antaŭe, ĉirkaŭita de grandega sekvantaro de pastroj, ploristinoj, soldatoj kaj popolo, meze de la incensa fumo, muziko kaj kantoj, ĝi traveturis la ĉefan straton de Teboj.

Tio estis eble la plej bela strato en la egipta regno: larĝa, glata, kun du vicoj de arboj. Ĝiaj kvar- eĉ kvinetaĝaj domoj, de la fundamento ĝis la supro estis kovritaj de mozaiko, aŭ skulptitaj kolore. Tio faris impreson, ke oni pendigis sur la konstruaĵoj grandegajn kolorajn tapiŝojn, aŭ ke oni kovris ilin per kolosaj pentraĵoj, prezentantaj la laboron de l' komercistoj, metiistoj, maristoj, kaj malproksimajn landojn kaj popolojn.

Unuvorte, tio ne estis strato, sed pli ĝuste grandega galerio de pentraĵoj, barbare designitaj, trobrile pentritaj.

La funebra procesio trairis de la nordo al la sudo du kilometrojn. Proksimume en la centro de l' urbo ĝi haltis kaj poste sin turnis al la okcidento, al Nilo.

En tiu loko, en la mezo de la rivero estis granda insulo, al kiu kondukis ponto, konstruita sur ŝipetoj. Por eviti malfeliĉan okazon, la generaloj komandantaj la procesion ankoraŭ unu fojon ordigis la sekvantaron, starigis po kvar homoj en ĉiu vico kaj ordonis al ili iri tre malrapide, ne paŝante ritme. Por tiu celo la orkestroj en la fronto ludis kantojn, ĉiun de malsama takto.

Post kelke da horoj la procesio trapasis unu ponton, la insulon, la alian ponton kaj atingis la maldekstran, okcidentan bordon de Nilo.

Se la orientan parton de Teboj oni povas nomi la urbon de l' dioj kaj reĝoj, la okcidenta estis la kvartalo de memorigaj temploj kaj tomboj.

La procesio iris de Nilo al la montoj, tra la meza vojo. Sude de la vojo sur altaĵo staris templo, memoriganta la venkojn de Ramzes III; ĝiaj muroj estis kovritaj per portretoj de la venkitaj popoloj: Ĥetoj, Araboj, Libianoj, Amoreoj, Filistenoj, Etiopianoj. Iom pli malsupre leviĝis du grandegaj

statuoj de Amenhotep II, kvin etaĝojn altaj, malgraŭ ĝia sidanta teniĝo. Unu el la statuoj posedis miraklan econ: kiam la radioj de la leviĝanta suno falis sur ĝin, la statuo sonis, kiel harpo, kies kordojn oni disŝiris.

Ankoraŭ pli proksime de la vojo, ĉiam maldekstre de ĝi, staris Ramesemu, ne tre granda, sed bela templo de Ramzes II. Ĝian peristilon gardis statuoj, kun la simboloj de la reĝa povo en la manoj. En la korto estis ankaŭ statuo de Ramzes II, kvar etaĝojn alta.

La vojo seninterrompe iris delikate supren; pli kaj pli klare oni povis vidi la krutajn altaĝojn, truitajn kvazaŭ spongo: tio estis la tomboj de la egiptaj altranguloj. Ĉe la eniro al ili, inter krutaj ŝtonegoj troviĝis la tre originala templo de la reĝino Hatasu. La konstruaĵo estis kvarcent kvindek paŝojn longa. De la korto, ĉirkaŭita de muro, oni eniradis en alian korton, ĉirkaŭitan de kolonoj, sub kiu estis subtera templo. De la kolona korto oni eniradis per ŝtuparo en templon, elhakitan en ŝtonego, sub kiu ankaŭ estis subteraĵoj.

Tiamaniere la templo havis du etaĝojn: malsupran kaj supran, el kiuj ĉiu estis dividita same. La ŝtuparo estis grandega; anstataŭ balustrado ĝi havis du vicojn de sfinksoj; la eniron al ĉiu ŝtuparo gardis du sidantaj statuoj.

De la templo de Hatasu komenciĝis malgaja intermonto, kiu kondukis de la tomboj de l' altranguloj al la tomboj de l' reĝoj. Inter ĉi tiuj du kvartaloj estis la elhakita en ŝtonego tombo de la ĉefpastro Retemenof; ĉambroj kaj koridoroj, formantaj ĝin, okupis sub la tero pli ol unu hektaron.

La vojo en la intermonto fariĝis tiel kruta, ke la homoj devis helpi la tirantajn bovojn kaj puŝi la funebran ŝipeton. La sekvantaro iras kvazaŭ sur kornico, elhakita sur flanko de la ŝtonego, fine ĝi haltas sur vasta placo, dekelkon da etaĝoj super la fundo de la intermonto.

Tie troviĝas pordo, kondukanta en la subteran tombon, kiun konstruis al si la faraono dum la tridek jaroj de sia regado. Ĉi tiu tombo estas tuta palaco kun ĉambroj por la sinjoro, por la familio kaj servistoj, kun manĝoĉambro, dormoĉambro kaj banejo, kun kapeloj de diversaj dioj, fine kun puto, sur kies fundo estas malgranda ĉambro, en kiu eterne ripozos la mumo de la faraono.

Ĉe la ruĝa lumo de la torĉoj oni vidas la murojn de ĉiuj ĉambroj, kovritaj de preĝoj kaj pentraĵoj, kiuj prezentas ĉiujn okupojn kaj distraĵojn de la mortinto: ĉasojn, konstruadon de temploj kaj kanaloj, triumfajn vojaĝojn, solenojn je la honoro de l' dioj, batalojn kontraŭ la malamikoj, laboron de la popolo...

Sed tio ne sufiĉas: la ĉambroj ne nur estas plenplenaj de mebloj, vazoj, veturiloj, armiloj, floroj, viando, kukoj, vino, sed estas tie ankaŭ multe da

statuoj. Tio estas diversaj portretoj de Ramzes XII, de liaj pastroj, ministroj, virinoj, soldatoj kaj sklavoj. La sinjoro eĉ en la alia mondo ne povas vivi sen multekostaj mebloj, sen luksa manĝo kaj sen fidelaj servistoj.

Kiam la funebra veturilo haltis ĉe la eniro en la tombon, la pastroj prenis la reĝan mumon el la sarkofago kaj metis ĝin sur la tero, apoginte la dorson al la ŝtonego. Tiam Ramzes XIII bruligis incenson antaŭ la restaĵoj de l' patro, kaj la reĝino Nikotris, ĉirkaŭpreninte la kolon de la mumo, komencis paroli kun larmoj:

—Mi estas via fratino, via edzino Nikotris, ne forlasu min, ho granda! Ĉu vi efektive deziras, mia bona patro, ke mi foriru? Se mi forirus, vi restus sola, kaj ĉu iu estos kun vi?...

La ĉefpastro Herhor bruligis incenson antaŭ la mumo, kaj Mefres verŝis vinon kaj diris:

—Al via samulo mi oferas tion, Oziris-Mer-amen Ramzes, monarĥo de Malsupra kaj Supra Egiptoj, kies voĉo estas justa antaŭ la granda dio.

Poste eksonis la larmistinoj kaj pastraj ĥoroj:

Ĥoro I. —Plendu, plendu, ploru, ploru, senĉese ploru, tiel laŭte, kiel vi povas...

La ploristinoj. —Ho nobla vojaĝanto, kiu direktas siajn paŝojn al la lando de la eterneco, kiel rapide oni forŝiras vin de ni!...

Ĥoro II. —Kiel bela estas, kio okazas al li! Ĉar li tre amis Ĥonsu'n de Teboj, la dio permesis al li atingi la okcidenton, en la mondo de la generacioj de liaj servistoj.

La ploristinoj. —Ho vi, kiun ĉirkaŭadis tiom da servistoj, nun vi estos en la tero, kiu ordonas la solecon... Vi, kiu havis delikatajn vestojn kaj amis puran tolaĵon, vi kuŝas nun en la vesto hieraŭa!...

Ĥoro I. —En paco al Okcidento, ho nia sinjoro, iru al Okcidento... Ni ree ekvidos vin, kiam venos la tago de la eterneco, ĉar vi iras en la landon, kiu kunigas ĉiujn homojn.

Komenciĝis la lastaj ceremonioj.

Oni alkondukis bovon kaj antilopon, kiujn devis mortigi Ramzes XIII, sed mortigis ilin lia anstataŭanto religia, la ĉefpastro Sem. La malsuperaj pastroj rapide buĉis la bestojn; Mefres kaj Herhor preninte la femurojn, vice almetis ilin al la buŝo de la mumo. Sed la mumo ne volis manĝi, ĉar ĝi ne estis ankoraŭ vivanta, kaj ĝia buŝo estis fermita.

Por forigi la malhelpon, Mefres lavis ĝin per sankta akvo kaj ĝin incensis per parfumoj kaj aluno, dirante:

—Jen staras mia patro, jen staras Oziris-Mer-amen-Ramzes. Mi estas via

filo, mi estas Horus, mi venas al vi, por vin purigi kaj vivigi... Mi ree kunmetas viajn ostojn, kunigas, kio estis distranĉita, ĉar mi estas Horus, la venĝanto de mia patro... Vi sidas sur la trono de Re, kiu venas de Nut, kiun naskas Re ĉiumatene, kiu naskas Mer-amen-Ramzeson ĉiutage, kiel Re.

Parolante tiel, la ĉefpastro tuŝis per amuletoj la buŝon, bruston, manojn kaj piedojn de l' mumo.

Ree eksonis la ĥoroj.

Ĥoro I. — Oziris-Mer-amen-Ramzes manĝos de nun kaj trinkos ĉion, kion manĝas kaj trinkas la dioj. Li sidas sur ilia loko, li estas sana kaj forta, kiel ili...

Ĥoro II. — Li havas la povon en ĉiuj siaj membroj; li malamas ne manĝi, kiam li estas malsata, kaj ne trinki, kiam li soifas.

Ĥoro I. — Ho dioj, donu al Oziris-Mer-amen-Ramzes mil milojn da kruĉojn da vino, mil vestojn, panojn kaj bovojn...

Ĥoro II. — Ho vi, vivantaj sur la tero, kiuj trapasos ĉi tie, se la vivo estas por vi kara kaj la morto abomena, se vi deziras, ke viaj honoroj transpasiĝi al viaj posteuloj, diru ĉi tiun preĝon por la mortinto, enterigita ĉi tie...

Mefres. — Ho vi grandaj, vi profetoj, vi princoj, skribistoj kaj faraonoj, vi aliaj homoj, kiuj venos mil jarojn post mi, se iu el vi anstataŭ mia nomo metus la sian, Dio punos lin per la detruo de lia persono sur la tero...

Post ĉi tiu malbeno la pastroj ekbruligis la torĉojn, prenis la reĝan mumon kaj remetis ĝin en la keston, kaj kun la kesto en la ŝtonan sarkofagon, kies ĝeneralaj konturoj havis homan formon. Poste ili forportis la grandegan ŝarĝon en la tombon.

Trapasinte ĉe la lumo de l' torĉoj kelke da koridoroj kaj ĉambroj, ili haltis en unu, kie estis la puto. Ili mallevis la sarkofagon en la truon kaj ili mem eniris post ĝi en la malsupran subteraĵon. Tie ili lokis la sarkofagon en malvasta ĉambro kaj rapide masonis la truon, tiel ke eĉ la plej sperta okulo, ne trovis la eniron en la tombon. Poste ili revenis supren kaj same zorge masonis la eniron en la puton.

Ĉion ĉi plenumis la pastroj mem sen atestantoj, kaj plenumis tiel perfekte, ke la mumo de Ramzes XII ĝis la hodiaŭa taĝo ripozas en sia mistera loĝejo, rifuĝinte tie ne nur de la ŝtelistoj, sed ankaŭ de la moderna scivolemo. Dum dudek naŭ jarcentoj oni superfortis multe da reĝaj tomboj, sed ĉi tiu restis netuŝita.

Dum unu pastra grupo estis kaŝanta la restaĵojn de la pia faraono, alia, lumiginte la subterajn ĉambrojn, invitis la vivantojn al festeno.

En la manĝoĉambro eniris Ramzes XIII, la reĝino Nikotris, Sem kaj dekelko da civilaj kaj militistaj altranguloj. En la mezo de la ĉambro staris tabloj, ŝarĝitaj per manĝaĵoj, vino kaj floroj, kaj apud la muro sidis la porfira statuo de l' mortinta sinjoro. Ĝi ŝajnis rigardi la ĉeestantojn kaj per melankolia rideto inviti ilin al la manĝo. La festeno komenciĝis per sankta danco, akompanata de la kanto de unu el la plej altaj pastrinoj:

"Ĝuu la tagojn de l' feliĉo, ĉar la vivo daŭras nur unu momenton... Ĝuu la feliĉon, ĉar kiam vi eniros en la tombon, vi ripozos tie eterne, la tutan longon de ĉiu tago!..."

Post la pastrino ekparolis profeto, kaj akompanata de harpoj, li diris per kantanta voĉo:

"La mondo estas senĉesa ŝanĝo kaj senĉesa renovigo. Tio estas saĝa aranĝo de la sorto, admirinda decido de Oziriso, ke kiam unu korpo detruigĝas kaj pereas, restas post ĝi aliaj korpoj... La faraonoj, ĉi tiuj dioj, kiuj estis antaŭ ni, ripozas en siaj piramidoj; iliaj mumoj kaj samuloj restis; sed la palacoj, kiujn ili konstruis, ne restas plu sur la antaŭaj lokoj, ili ne ekzistas plu... Ne malesperu do, sed sekvu vian deziron kaj feliĉon; ne uzu vian koron, antaŭ kiam venos la tago en kiu vi petegos, kaj Oziriso, la dio, kies koro ne batas plu, favore aŭskultos viajn petojn... La plendoj de la tuta mondo ne redonos la feliĉon al la homo, kiu kuŝas en la tombo; ĝuu do la tagojn de la feliĉo kaj ne estu maldiligenta en la ĝojo. Vere, ne ekzistas homo, kiu povos kunporti sian havon en la alian mondon, vere, ne ekzistas homo, kiu foriris tien kaj revenis!..."

La festeno estis finita kaj la ĉeestantoj, ankoraŭ unu fojon incensinte la statuon de la mortinto, ekiris revene al Teboj. En la templo de la tombo restis nur pastroj, por akurate fari oferojn al la sinjoro, kaj soldatoj, por gardi la tombon de malpiaj atencoj de l' ŝtelistoj.

Ramzes XII restis sola en sia mistera ĉambro. Tra la malgranda fenestro, kaŝita en la ŝtonego, apenaŭ penetris al li la krepusko; anstataŭ strutaj plumoj murmuretis super la sinjoro la flugiloj de l' grandegaj vespertoj; anstataŭ muziko sonis nokte ĝemantaj blekoj de l' hienoj, kaj de tempo al tempo la potenca voĉo de la leono, kiu de sia dezerto salutis la faraonon en la tombo.

Daŭrigota



Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels110.pdf>

Numero 110 - Novembron 2019



ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88